ĝeneralan decidon, ke ĉiuj infanoj, kiuj ankoraŭ ne estas sepjaraj, povas eksiĝi kun siaj gepatroj el ekleziaj kaj religiaj unuiĝoj kaj ke neniu senkonfesia infano povas esti devigata viziti ian religian instruon. La konstitucia tribunalo decidis, ke ankaŭ la senkonfesieco estas konfesio kaj tial la senkonfesiuloj devas ĝui la samajn rajtojn kiel la konfesiuloj. Longdaŭra batalo, kiu okupis distriktkapitanaĵojn, landajn registarojn kaj ministeriojn, estas per tio por ni venke finita. Eble en eksterlando povas esti konsiderata kiel logikaĵo tio, ke ankaŭ senkonfesiuloj ĝuas ŝtatan ŝirmon; en Aŭstrio, kie la senkonfesiuloj ĝis nun estis ekster leĝa ŝirmo, validas ĉi tiu ŝanĝo de nia jurpercepto kiel senekzempla sukceso kaj ne estas troigo, kiam ni diras, ke estas la merito sole de la liberpensula ligo, esti veniginta ĉi tiun novan direkton.

Tiel la aŭstria liberpensularo ĉiam pli kaj pli grandiĝas. Ĝi disvastiĝas kaj profundiĝas. Tute nova generacio maturiĝas. La plej ĝojiga je la aŭstria liberpensularo estas la fakto, ke ĝi estas ĉefa apogilo por la socialismo. Ĉiam pli kaj pli montriĝas la fakto, ke socialismo kaj liberpensulado ne estas disigeblaj, kaj kie ili estas kuniĝintaj harmonie, tie la venko ne forrestos.

Reinhardt Rössler.

Tradukis laboremuloj el la SAT-rondo Linz.

★

# Kvinjaro de IRH (MOPR) en Sovetio

En nuna jaro kvin jarojn ekzistas Internacia Ruĝa Helpo (MOPR) en Sovetio. 18. marto, la tago de IRH, estos malfermata 2. Tutsovetia Kongreso de MOPR. Ĝi nun havas 3 490 699 membrojn, el kiuj 2 589 037 estas senpartiaj laboristoj kaj vilaĝanoj, ruĝarmeanoj kaj oficistoj, kiuj dum 5 jaroj kolektis inter si 8 108 023 rublojn. 8880 politikaj elmigrintoj el eksterlando ricevis kun siaj familioj subtenon de MOPR. Monhelpon ricevis dekmiloj da politikaj malliberuloj. MOPR-ĉeloj kaj organizoj regule plenumas protektadon al enkarcerigitoj en kapitalistaj landoj. El 160 malliberejoj estis ricevitaj dum tiu ĉi tempo 957 leteroj kaj senditaj 6444. (Sendube ne ĝuste enkalkulita nia esperanto-korespondado.) La kvinjaro devas instigi nin por plifortigo de peresperanta servo ĉe MOPR. Kiu deziras ligiĝi kun Moskvaj MOPR-ĉeloj, skribu al: Moskva Gub. Komitato de SEU, ul. Frunze 18, 21 ŝkola, Moskvo 19. Salutleteroj alvenu antaŭ la Kongreso (ĝis 12. 3.).

(259.)

# EL LA DEMOKRATA SVISIO

Por difini la ĝeneralan spiritostaton de tiu lando, sufiĉas montri al tutmonda stato; ĉiam pli kreskanta reakcio. En Svisio, kie fondiĝis en jaro 1877 la granda kontraŭalkohola asocio "Blua Kruco", oni nuntempe konsumas pli ol 6 litrojn da alkoholo jare po loĝanto. Svisio rangas en unua loko inter la landoj rilate al senpatraj naskiĝoj, memmortigoj, ftizo. Neŭtrala dum la lasta milito, ĝi febre produktis municion por ambaŭ tendaroj de militantoj. Naskolando de la Ruĝa Kruco, ĝi ege profitis per la milito pro gajna akceptado de militviktimoj. Malgraŭ relative bona situo oni tie pagas altajn impostojn, t. e. 200 orfrankojn dum jaro.

Jaron post jaro la svisa popolo glitas pli en barbarecon; nun jam estas malfacile trovi homon inter profitemulo kaj stultulo. La lasta monstraĵo estas la akcepto de la fama sklaviga leĝo por oficistoj per la registaro kaj la parlamento.

Sed ni rigardu ankoraŭ alian flankon de svisa bildo. Dum pasinta decembro l' "Association des instituteurs genevois" (Asocio de ĝenevaj instruistoj) starigis programon por venonta svisia kongreso. Tiu laborprogramo subskribita de 60 viraj instruistoj estas jene resumebla:

1. Starigi solidarecon ĉe la bazo de instruado; 2. Forigi el la lernolibroj ĉiun ŝovinistan spiriton; 3. Eligi el lernoĉambroj ĉiujn kontraŭpacifismajn objektojn; 4. Instigi la lernantaron por internacia korespondado kaj lernigi esperanton; 5. Militi kontraŭ alkoholo; 6. Konstruigi lernejojn laŭ leĝoj de higieno; 7. Komprenigi al la infanoj la malutilon de milito; 8. Glori la laboron; 9. Akcepti la seksegalecon; 10. Konsiderante, ke la ĉefa rimedo kontraŭ la milito estas la senarmigo, la AIG alvokas la svisajn instruistojn postuli la nuligon de milita buĝeto. Per mono tiel ŝparita estu akcelata la kreo de asekuro por maljunuloj kaj lukto kontraŭ ftizo kaj kancero.

Tiu kuraĝa laborprogramo estis tuj publikigita kaj efikis kiel ŝtono ĵetita en akvon. Tuj la reakcio kriegis per ĵurnaloj kaj popolaj kunvenoj. Unuanime oni postulis la malpermeson de instruado por la 60 malpatriotaj instruistoj. La 28. jan. la ĝeneva parlamento diskutis pri la afero. Tie la Estro pri Instruado deklaris, ke la instruistoj ne kulpas, ĉar ili ne mem publikigis sian deklaron; plie, ke ili obeis al nova voĉo de konscienco, ne al krima ideo. Ili estus punindaj nur, se ili fuŝus en la instruado, sed en tiu okazo pekis nur administracie, kaj tiusence estis jam administracie punitaj.

La krio de la ĝenevaj instruistoj estas ankoraŭ pala kaj malfortika, sed kuraĝa. Kiu SAT-ano sendos kuraĝigan — sed moderan — leteron al AIG?

O. Schweitzer.

# Faktoj kaj komentoj

**Usona Kapitalo invadas pra-densejojn en Brazilio . . .**

Mi supozas, ke la braziliaj patriotoj tre koleras kontraŭ sia registaro. Ili certe havas motivon. Tiu registaro ja malpatriote koncesiis al s-ro Ford 16 000 kv. kilometrojn da grundo en la Amazona baseno. La mondfama aŭtomobil-konstruisto planas en la tiea densejo, apenaŭ esplorita, kreskigi kaŭĉuk-arbojn. Laŭ jam starigitaj planoj, la transporto de laboristoj kaj materialoj okazos ŝipe kaj aeroplane. Necesos proksimume 10 jaroj antaŭ ol la kaŭĉuk-arboj povos liveri la lateksonⁱ).

Do, la laboristoj estos tie ekspluatataj per la usona kapitalo, anstataŭ per la brazilia.

Pri tiu malpatriotaĵo ni faru nur jenan rimarkon: En la loko, kie nuntempe vivas "sendepende" sovaĝaj bestoj, kie homaj piedoj ĝis nun ne paŝis, post kelkaj jaroj vivos multnombraj laboristoj; tie enplantiĝos la kapitalismo, tie klasbatalo sekve okazos kaj tiel estiĝos kondiĉoj favoraj al la starigo de l' socialismo.

**. . . sed ankaŭ la ĉefurbon de Francio**

Ne nur la senhomajn densejojn de Brazilio invadas la usona kapitalo. Lastatempe la francia burĝa gazetaro diskrete sciigis, ke la "International Telephone and Telegraph Corporation" (Internacia Telefona kaj Telegrafa Korporacio) ricevis la mendon pri instalo de la aŭtomata telefono en Parizo.

Kiom abomeninde! Des pli, ke tio okazis malgraŭ la protestoj de la "CGT" (Ĝenerala Konfederacio de l' Laboro), el kiuj ni citu jenon: "La 'CGT' estas preta defendi la heredan posedaĵon de la nacio; ĝi ne permesos la senhonorigan fortranĉon, kia estus la koncesio al internacia asocio de unu el la servaparatoj, kies graveco estas fundamenta por la sendependa vivo de nia lando."

Ĉu necesas komento? Tute ne. Estas klare, ke la gvidantoj de la "CGT" estas pli bonaj patriotoj ol Poincaré (Puenkare) mem.

E. L.

[1]) lakteca fluidaĵo, kiu malfluidiĝante, konsistigas la kaŭĉukon.